

Ni aŭskultu Denis de Rougemont, 5-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 764, 1978.06.01 & 03

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En sia libro "L'Avenir est notre Affaire" (Estonteco estas nia afero) Denis de Rougemont sin esprimas tre precize koncerne la temon prospektado futur-divenan. Per esperantigitaj citaĵoj ni provos resumi la penson de la svisa verkisto.

A.- Denis de Rougemont unue konstatas, ke nia estonteco strikte dependas de la politikaj solvoj, kiujn ni decidis por organizi nian kontinenton. La hodiaŭaj Naci-Ŝtatoj centralizemaj, kiuj karakterizas Eŭropon, "senescepte estas samtempe tro etaj, se oni ilin rigardas laŭ mondskala vidpunkto, kaj tro grandaj, se oni prijuĝas ilian nekapahlon vivi la proprajn regionojn kaj proponi al la civitanoj veran partoprenon en la politika vivo, kiun ili pretendas monopoligi." (p. 115). Por Denis de Rougemont la nura solvo troviĝas en dudimensia federigo: "Ĉar ili estas tro etaj, la Naci-Ŝtatoj devus federigi je la kontinenta dimensio; kaj ĉar ili estas tro grandaj, ili devus interne ankaŭ federigi." (p. 115-114).

Cl.- « Supervenki la Militon », jen la ĉefa hodiaŭa tasko. (p. 126). "La naciista pasio science kaj racie nedefendebla, praktike neŭtraligas la transportan plirapidiĝon." (p. 127). Denis de Rougemont tiurilate donas ekzemplojn. La akiro de transport-permesoj okazigas ofte plurmonatajn demarŝ-klopodojn por posta kelkhora flugo. "La politika pasio drenas kaj flamigas niajn neraciajn kapablojn, superstiĉojn kaj antaŭjuĝojn lokajn. Tiuj ĉi pasioj produktas militojn. Tiam la teknikaj detruoblecoj estas disponigitaj je ĉies uzo, multe pli malavare ol la konstrueblecoj dum pac-periodo." (p. 127)

A.- "Kontraŭ la defio de la Naturo ni ne jam respondis per plena venko..., sed la rimedoj por tiu ĉi venko troviĝas de nun en niaj manoj. La ĉefa kontraŭstaro al la teknika progreso jam ne estas plu en la materio, sed en la homo. Nian ekzistadon sur la planedo ne minacas plu la elementoj, sed niaj maŝinoj, instrumentoj de niaj pasioj. Du elirejoj ŝajnas al (Denis de Rougemont) ekde nun imageblaj:

C1.- "Unue: Ni daŭrigas nian teknikan streĉon (mastradon de la atomenergio) neglektante la kultivadon de la pasi-kampoj (naciismo, partizana politiko). Tiam la pasioj proprigos al si teknikon kaj okazigos atom-militon..." (p. 128).

A.- "Due: Ni respondas al la defio de la pasioj naciistaj kaj politikaj per tutmonda organizo kapabla kontroli la atom-armilojn. Milito fariĝos neebla. Landlimoj fariĝos apenaŭ videblaj... Unuafoje en la mondhistorio ekzistos nur unu sola civilizo..., unu sola suverena Nacio federaci-tipa; ...la sociaj demandoj, anstataŭ paroksismiĝi, emos solviĝi en organizitan prosperon." (p. 128)

Cl.- Denis de Rougemont opinias, ke "en tiu ĉi dua parto de la 20-a jarcento oni povas antaŭvidi egalŝance militon kaj pacon; aŭ la defio de niaj pasioj montriĝos tro potenca kaj nia civilizo mortos pro ĝi, aŭ ni supervenkos tiun ĉi defion per la starigo de monda registaro, liberigante la sciencan serĉadon" profite al pacceloi. (p. 128-129).

A.- Okaze de pac-venko Denis de Rougemont sin tuj demandas, kiu nova defio minacus la homaron, kaj li konkludas, ke "tutcerte estus tiu de la Enuo." (p. 129).

Cl.- "Enuo... naskiĝas de kompleta foresto de precizaj minacoj... La homaro povus respondi al ĝi nur per metafizika elekto. Ĝi povus elekti la spiritan anestezon aŭ la spiritan aventuron." (p. 129-130).

A.- Denis de Rougemont atentigas nin kontraŭ la hodiaŭa esplorado futurdivena, kiu tre ofte estas je la servo de milit-ekonomio aŭ de malvasthorizonta konservatismo. (p. 148-158). Tiu ĉi prospekto estas sklaviga kaj danĝera.

Cl.- Por Denis de Rougemont "la esploro devas montri al ni la neceson elekti, sed ne fari la elekton por ni." (p. 148). Li proponas "analizon de la motivoj kaj de la celoj" (p. 159), kiun la futurologoj neglektis. Estus analizo, kiu "forigus ĉiujn rimedojn, kies nekontrolita uzo... kondukus al kalkulebla eksponenta kresko; ĝi kontraŭe advokatus ĉiujn rimedojn, kies eklaboro povus favori ekvilibron en la movo, kiam temas pri la homa specio, kaj pluson de libereco-responseco, kiam temas pri la personoj. E1 tio la sekvanta regulo: antaŭ ĉiu teknologia novenkonduko esti kapabla demonstri ne nur al kio ĝi utilos, sed ĉefe al kio ĝi kondukos en hipotezo de plensukceso." (p. 158). "Tiun ĉi analizon de la motivoj kaj celoj neniuj faras hodiaŭ." (p. 159).

A.- Sed "fine la estonta modelo, kiun oni ellaboros (helpe de similaj analizoj pri la motivoj kaj celoj) devas resti malpreciza. Alie ĝi estus tiranio por la komunumo, kiu ĝin realigus, kaj ekde nun por nia imag- kaj invent-povo." (p. 159)

Cl.- "Multaj problemoj ĝenerale starigitaj de esplorado malaperus, se ni konsiderus la evidentajn, ke "scienca" futurologio povas antaŭvidi nur ion kalkuleblan, kaj ke io kalkulebla malofte estas decidiga, kvankam utila por sektora pritaksado. Ne estas tekniko, kiu faras Historion, sed niaj deziroj aŭ aspiroj, kies nura ilo estas tekniko." (p. 181).

A.- Por Denis de Rougemont ni staras antaŭ preciza "alternativo: refari socion, kies fundamento estas la personaj rilatoj, la komunumoj, la regionoj; aŭ kontraŭe disvastigi tutmonden diktaturon, pri kiu Orwell donas ideon kaj la komputeroj la rimedojn." (p. 197). Kaj li aldonas: "Diktaturo ne bezonas imagpovon: sufiĉas sin lasi gliti. Sed la pluvivo de la homaro en liberaera, natur-kondiĉaro supozas bildojn de antaŭvidita feliĉo, supervenkotan heĝon, horizonton.

Cl.- Se Denis de Rougemont advokatas por federacia reorganizo de Eŭropo profite al la kreo de regionoj ne plu dependantaj de la Naci-Ŝtatoj, sed de la volo de la propraj loĝantoj kaj de kontinenta federacia organizo, li evitas ĉian precizan priskribon de tiu ĉi idealo. Kiel ni jam diris, ĉia "estonta modelo... devas resti malpreciza. Alie ĝi estus tiranio por la komunumo, kiu ĝin realiĝos, kaj ekde nun por nia imag- kaj invent-povo." (p. 159). Denis de Rougemont volas instigi al kontraŭdiktatura kaj kontraŭmilita konduto, proponante alternativon fruktodonan: sed pli precizan modelon li rifuzas doni. La homoj pruvu, ke ili konservis plenan imag- kaj invent-povon por konstrui Eŭropon, kiu estu federacio de memstaraj regionoj, kie la civitanoj povos vigle defendi siajn vivrajtojn kaj lokajn originalaĵojn lernante samtempe kontinentan solidarecon.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!